



Foto de Adam Wilkus

Krakovo mem estas luksa! Ĉiuj tuj rimarkas, ke la urbo havas ĉarmon kaj propran etoson, kaj ke necesas pli da tempo por viziti ĝin... do ili revenas... Ankaŭ ege allogas la minejo en Wieliczka — monduka, kun artaĵoj skulptitaj en salo-ŝtonegoj!

Pri tio, ke Krakovo havas buntan, firman kaj diversaspektan E-agadon, ne necesas konvinki iun ajn! Nek pri tio, ke ĝi estas sidejo de la pola sekcio de ILEI.

**ilei**



# LA 42A KONFERENCO DE ILEI

## *La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado*

17-25 de julio 2009

Krakovo, Pollando



Foto de Adam Wilkus

**Venu konferenci EN LA PLEJ FAMA  
POLA URBO,  
Eŭropa Kultururbo, Krakovo!**

## POR LA PROGRAMO NI ANTAŬVIDAS:

- Interkonan manĝvesperon
- Solenan Inaŭguron
- Simpozion laŭ konferenca temo
- Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj
- Seminarion de E@I
- Seminarion de *lernu!*
- Seminarion de InterKulturo
- Apartan programon por universitataj instruistoj
- Kunlaboresiojn kun AIS kaj ISAE
- Laborgrupojn laŭ diversaj temoj
- Kelknivelajn lingvajn kursojn
- Programerojn por instruemuloj
- Studrondon pri E-literaturo
- Prelegojn de partoprenantoj
- Riĉan ekskursan programon
- Buntan kaj varian kulturalan programon
- Distran programon ĉiuvespere



Foto de Adam Wilkus

Ni konferencos en E-ejo: la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo, en kiu oni jam instruis E-on kaj en kies oficiala strukturo aktivis Studenta E-Rondo (unu el du oficialaj en Krakovo kaj Pollando). La Lernejo iĝis partnero de ILEI por la konferenco en 2009.



Foto de Adam Wilkus

**Informoj** pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj aperos en Internacia Pedagogia Revuo (IPR) kaj en retpaĝo de ILEI [www.ilei.info](http://www.ilei.info). Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn, Vi ĉiam estas bonvena **skribi** al:

**Aida Ĉiĝikaitė** [aidute@mail.lt](mailto:aidute@mail.lt) (ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj **Małgorzata Komarnicka** [margareta.ilei.pollando@gmail.com](mailto:margareta.ilei.pollando@gmail.com) (ĉefa loka organizanto).